ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 12

DECEMBRO 2013 Kol.344/29

xxxx

sporade du jarojn. Poste prenis la "falintan torĉon" la Esperanto-klubo en la sveda urbo Uppsala, kiam decembre 1895 aperis la unua numero de "Lingvo internacia".
Do tio estis presitaj vortoj. Sed estus interese scii, ĉu oni povus per Esperanto ankaŭ interparoli senprobleme. La unua granda organizita internacia kunveno okazis en la franca urbo Kalezo (Calais) en aŭgusto 1904. Ĉirkaŭ 180 homoj ĉeestis, ĉefe britoj kaj francoj. Tiam la franco Alfred Michaux invitis la esperantistojn al vera E-kongreso en Bulonjo ĉe Maro (Boulogne sur Mer) por posta jaro. La Unua mondkongreso okazis tie – en norda Francio ĉe la Kanalo la Manche. La komenco estis la 5-an de aŭgusto 1905. Ĉeestis 688 homoj el 20 landoj. De tiam ĉiujare (kun esceptoj de ambaŭ mondmilitoj) okazadas la kongresoj. Nur poste oni komencis nomi ilin "Universala kongreso de Esperanto".

Ekde la jaro 1933 la UK-ojn okazigas kaj gvidas UEA – Universala Esperanto-Asocio. Kuriozaĵo estis la 10-a UK en Parizo (j. 1914). Ĝi devus esti grandioza aranĝo kun rekorda nombro de aliĝintoj 3 739. Sed ho ve – kiam alveturis samideanoj en Parizon el multaj landoj, eksplodis la unua mondmilito. Do – la UK reale ne okazis. Tamen iasence oni eĉ malfermis la menciitan 10-an UK-on. Kelkaj samideanoj trovis la diligentan sinjoron Gabriel Chavet (li estis kongresa sekretario) ĉe lia laborego kaj ili kunvenigis kiel eble plej multe da esperantistoj por improvizita kunveno. Chavet, tre emociita, faris ian malferman paroladon por tiu kongreso, kiu NE okazis. Tamen oni oficiale kalkulas tiun UK, kiel la 10-an.
En la ĝisnuna teksto mi iom konsultis la libron "Zamenhof" de Marjorie Boulton. Antaŭ nelonge mi informiĝis el E-gazetoj, ke la jubilea 100-a UK en la jaro 2015 okazos en la franca urbo Lillo (nacilingve: Lille) – en la sama regiono kiel Bulonjo. Jen inspira allogaĵo. Ĝi vekas ideon partopreni ĝin. Jiří Rada el la urbo Most

La konferenco de Ĉeĥa Esperanto Asocio

okazis en la urbo Nymburk 25. – 28. 10. 2013. La membroj tranoktis en la Domo de faka mezlernejo, kiu nun parte servas kiel hotelo. El ĝia alto (el la balkonoj) estis bela rigardo sur la panoramo de la urbo. Sed partoprenis nur kvindeko da membroj, eble pro la politikaj balotoj en nia ĉeĥa lando aŭ

pro plilongigita semajnfino (la festotago: datreveno de la ekesto de memstara Ĉeĥoslovakio).
La urbo estas ĉirkaŭita de la mezepokaj urbaj muregoj (sed ne en la origina amplekso), kiuj respeguliĝas en la rivero, tie estas bela promenejo por piedirantoj kaj biciklistoj. Nun al la konferenco mem:

Vendrede okazis paroliga kurso, diskuto inter ni ĉeestantoj kaj prezentitaj estis novaj libroj. Vespere ni ĝuis filmojn el UK en Rejkjaviko.
Sabate en ĉefa konferenca traktado estis sur granda ekrano projekciataj ĉiuj menciindaj agoj de la ĈEA, tabeloj, statistikoj, stato de membrobazo kaj ĉio estis prezentita en Esperanto, ĉar inter la partoprenantoj troviĝis la eksterlanda gasto (unusola) el Belgio, s-ro Marc Cuffez, prezidanto de FEL.
La vesperan sabatan programon inaŭguris dancgrupo de pliaĝuloj per vakeraj dancoj. Inter la grupo estis paro pli -ol- 80-jara. La dancado kun tombolo plaĉis al la partoprenantoj.
Dum la dimanĉa antaŭtagmezo daŭris la konferenca traktado kaj diskuto, posttagmeza ekskurso al la kastelo Loučeň estis interesa. Vespere estis projekciitaj pluaj filmoj. En la lasta antaŭtagmezo lunde estis partoprenantoj dividitaj en lingvajn laborgrupojn kaj post la tagmanĝo ili forveturis hejmen. red.

Ĉe la kastelo en Loučeň

Atentigo por la aliĝontoj de la 39-a lingva seminario en Bohemia paradizo en Skokovy! Venontjare ĝi okazos en la monato **majo** ! Do la seminario okazos de la 12. – 18. 5. 2014 ! Venu multnombre !

Bruno kaj Manjuan geedziĝis dank' al Esperanto

Tio okazis la 24-an de aŭgusto 2013 en la franca lorena urbodomo de Nilvange. La franco Bruno HENRY kaj la ĉinino Manjuan ZHANG sin dediĉis al komuna vivo. Multaj familianoj, amikoj, esperantistoj (inter aliaj Claude Nourmont, vicprezidantino de UEA kaj ŝia edzo Brian Moon, Sylviane Lafargue, vicprezidantino IFEF kaj ŝia edzo Henri akompanis ilin por ĉeesti tiun agrablan eventon. Post la oficiala ceremonio ni estis invititaj en la restoracion nomata Le Gueulard, kie ni gustumis kelkajn frandaĵojn kaj trinkaĵojn. En la salono, sur mura ekrano ili montris diapozitivojn pri la vizito de Bruno al sia onta ĉina bofamilio. Bona manĝaĵo, kompreneble en ĉina restoracio, finis tiun agrablan renkonton. Sed kiamaniere Bruno kaj Manjuan interkonatiĝis? Mi lasas al Bruno la plezuron malkovri tiun personan historion kaj levi la vualon de sur tiu nekutima cirkonstanco.

Jean Ripoche BLOGO: http://brunoh.olympe.in/

Noto: En tiu mineja regiono, tiu nomo **« Gueulard »** rilatas al la faŭko ĉe la supraĵo de altforno tra kiu ĝi estis ŝarĝata per fererco kaj koakso.

Geedziĝo Gracia kaj Bruno, la 24an de aŭgusto en Nilvange (FR-Moselle)

Ni, Gracia kaj Bruno estas anoj de la granda fervojista familio.

Dank' al Esperanto kaj la Koresponda Servo Mondskala ni interkonatiĝis. Gracia ofte diras dank' al Dro Zamenhof ni interkonatiĝis. Nia ĉiutaga lingvo estas la lingvo internacia Esperanto.

La komenco de nia aventuro okazis, kiam Bruno ricevis la unuan retmesaĝon de Gracia. En tiu momento Bruno estis en la urbo Shiraz, la pinto de sia vojaĝo en Irano, kie li vizitis geesperantistojn, la 14-an de aùgusto 2012.

De tiu momento ni korespondis ĉiutage eĉ ie ajn en la mondo. Poste ni interparolis pere de « Skype ». Finfine dum la pasinta vintro ni interkonatiĝis en la urbo Changsha, kie loĝas Gracia.

Changsha estas la ĉefurbo de la provinco Hunan. Dum du monatoj ni faris mirindan vojaĝon en Ĉinio per la trajno en la malmola klaso kun ĉina popolo kaj ni renkontis aliajn esperantistojn en diversaj urboj. Dank' al Gracia Bruno vizitis multajn historiajn urbojn, naturajn vizintindaĵojn en tiu mistera granda lando, riĉaj je historio kaj kulturo. Ni trapasis kelkajn tagojn en la kamparo kun ŝiaj familianoj kaj Bruno interkonatiĝis kun ŝiaj geamikoj kaj familianoj en la urbo Changsha.

Nun ni vivos kune en Changsha kaj Nilvange kaj ni vivos inter tri kulturoj: la ĉina, la franca kaj la Esperanta kulturo. Ni vojaĝos de tempo al tempo, renkontiĝos kun geamikoj kaj vizitos familianojn.
Unu el niaj ideoj: ni ŝatus vojaĝi de Changsha al Nilvange per la trajno tra Mongolio kaj Siberio. Eble survoje ni renkontos aliajn esperantistojn.

Manjuan (Gracia) ZHANG kaj Bruno HENRY el NILVANGE, FR.

Etsuo Miyoshi ricevis la Ordenon de la Leviĝanta Suno

La 12-an de novembro 2013 en la Imperiestra Palaco en Tokio la japana esperantisto kaj mecenato de Esperanto Etsuo Miyoshi ricevis la Ordenon de la Leviĝanta Suno. Ĝi estis donita al li pro la kreo de la bastonvalizo Walkin'Bag, kiu helpas handikapulojn por moviĝi ien ajn dum komercado, promenado, vojaĝoj, eĉ hejme. Etsuo Miyoshi mem rakontis pri la evento: "Preskaŭ unu mil ordenricevantoj estis en la granda halo. La Imperiestro gratulparolis. Poste li promene sin direktis rekte al mi. En mia koro regis konfuzo. Mi ne komprenis, kio okazis. Li afable demandis pri mia sano, mi dankis pro lia komplezo, kaj li kliniĝis. Sekve, la Imperiestro ĉirkaŭiris, salutante ĉiujn.

Post mia naskiĝo mi kaptis poliomjeliton. Infanoj primokis min, amikinoj foriris de mi, malfacilis al mi promeni, kaj nun mi batalas kontraŭ postpoliomjelito. Tiaj premoj trejnis min persisti en la kreado, surmerkatigo kaj manaĝerado de ĉio ajn. Tiel mi povis transiri Rubikonon. Retrorigardante mian vivon, mi konstatas, ke Dio benis min. Mia malsano utilis por helpi aliajn suferantojn kaj krei pli facilan vivon. Koran dankon pro via subteno kaj komprenemo por mia agado en Oomoto, Esperantujo kaj komercado". ret-info

Korespondi deziras:

Gvidanto de E-klubo en Kubo serĉas korespondantojn por 62 klubanoj.
Fragmento el lia letero:
La celo estas fari ponton por malfermi amikecon inter ni kaj aliaj, ĉar la esperantistoj en mia klubo soifas pri amikeco.
Mi estas IM de UEA per la Fondaĵo CANUTO kaj loĝas en la urbo Bayamo, provinco Granmo en Kubo. En nia klubo estas 62 membroj kaj ni havas malgrandan sidejon kun biblioteko, sed ni bezonas rilatojn. Karaj, la amikeco estas parto de la vivo por vivi, ĉu ne? Ni ĝojas je Viaj leteroj. Saluton al vi ĉiuj.
Rafaelo R. Cabrera Espinosa, (juristo), Apartado Postal 48, 85100 Bayamo, provinco Granma. elektronike: esperanto@crisol.cult.cu red.

La 25-a Eŭropa rendevuo
16. – 17. 11. 2013

La jubilea evento okazis semajnfine en “Stella-Plage” ĉe la nordfranca markolo en la bela kaj komforta feriejo “Stella Maris”. Ĝi estis bone organizita de la geedza paro Arlette kaj Edmond Plutniak. Tridek kilometrojn norde de “Stella-Plage” situas “Boulogne-sur-Mer”, la urbo de la unua Esperanto-kongreso. Rendevuis pli ol okdek esperantistoj el ok landoj. La plej multnombraj estis grupo de francoj de la norda regiono.
Sabate la 16-an de novembro 2013 post la akcepto de la alvenintoj Arlette

prezentis la novan prezidanton de la Nordfrancia E-Federacio Michel Dechy. Ŝi bonvenigis la partoprenantojn kaj skizis la programon, kiu tuj posttagmeze komenciĝis. Oni povis elekti el kvar eblaj programeroj. Katalin Kovats gvidis E-kurson por komencantoj, kiun povis observi ankaŭ instruantoj. Michel Dechy prezentis kaj animis kurson pere de Tinĉjo-albumoj, Anne Jausions prezentis la plej interesajn nuntempajn romanojn kaj Franjo Lévêque kantigis muzikŝatantojn kaj gvidis korusan atelieron. Ĉe la fino de la staĝo ili regalis nin per belaj kantoj.
Katalin disdonis atestilojn al ĉeestantaj esperantistoj, kiuj sukcesis en KER-ekzameno. Tre bone funkciis la libroservo de FEL prizorgata de la belga E-klubo de Gent. Laŭ la propono de Flory Witdoeckt el Belgio oni kolektis donacitajn librojn por esperantistoj de Kongo. En la ferieja restoracio ni bonege manĝis. Vespere ni ĝuis koncerton de Guillaume Armide kaj poste ni babilis en agrabla etoso trinkante cidron, oranĝsukon aŭ bieron.
Samtemaj programeroj daŭris dimanĉe antaŭtagmeze. Ekde la 11-a horo estis libera tempo. Oni povis trarigardi ekspozicion aranĝitan surloke kaj admiri belajn pentraĵojn de esperantistoj kaj ornamaĵojn el vitro faritajn de Katalin. Kelkaj eksponaĵoj estis aĉeteblaj. Iuj promenis ĝis la plaĝo, aliaj veturis kaj vizitis la najbaran urbon “Le Touquet”.

Antaŭ la tagmanĝo ni fotiĝis por memori la eventon. Loka ĵurnalistino aperigis artikolon pri la evento en franca ĵurnalo "La voix du Nord".

Posttagmeze la geedzoj Plutniak dankis al ĉiuj gvidantoj de kursoj kaj al la partoprenantoj. Ili ankaŭ gratulis la iniciatinton de tiu ĉi renkontiĝo s-ro Jean Dietrich, la honorprezidanto de la Norda Federacio, kaj la unuajn gvidintojn gesinjorojn Valet. S-ino France Valet rememorigis ĉiujn staĝojn, kiuj komenciĝis en Morbecque le Parc sub ŝia gvido. Poste estis prezentata sur ekrano la Eŭropa himno, Michel Dechy parolis pri sia entuziasmo rilate

al Tinĉjo kaj prezentis la ĵus eldonitan tradukon de la bildlibro: La Templo de l' Suno. Retan E-ludon RISKO prezentis Katalin, ĝia aŭtorino. Oni eĉ iom provludis por pli bone kompreni ĝin kaj instigi la partoprenantojn al ludado. La koruso fermis tiun mallongdaŭran, sed belan aranĝon. Koran dankon al la organizantoj pro ilia entuziasmo kaj bona poresperanta laboro!

Liba Gabalda

Kontentajn Kristnasko-festojn kaj belan kaj en bona sano travivotan novan jaron 2014 elkore deziras al vi ĉiuj el Zamenhofa vespero la redakcio de Informilo kun la parto de la komitato AEH el Pardubice. *red.*

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Kosnar, J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh-ikeh@volny.cz** interreto: **www.volny.cz/aeh-ikeh**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo= **200,-Kč**, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo **15 €.** Kodo ĉe UEA : aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.